

Leterkesto, 4.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI ..., 1991.04.18 & 20

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia. Hodiaŭ ni daŭrigas nian salutadon al la geaŭdantoj, kiuj sendis mesaĝon.

A.- Certe ni fuŝprononcas la familiajn kaj urbajn nomojn en la lingvoj, kiujn ni ne konas. Ni povus havi pli kontentigan proksimuman prononcon, se ĉiuj skribantoj aldonus interkrampe post siaj nomoj familiaj kaj urbaj la proksimuman prononcon per esperantaj literoj. Tio estus granda progreso, al kiu ni alvokas niajn geaŭdantojn. Ankaŭ ni ŝatus, ke ĉiu substreku la familian nomon, ke ni kapablu ĝin distingi de la individua, kio ne estas ĉiam tre facila. Do ĉiuj skribantoj ekde de nun bonvolu interkrampe doni al ni la prononcon de siaj nomoj kaj loĝloko kaj substreki sian familian nomon.

Cl.- Saluton al Juan NARVAEZ FERNANDEZ en Badajoz, Hispanio, kiu diras, kiom gravaj estas niaj elsendoj por izolitaj grupoj, kiel tiu en Badajoz. Li skribis: "Dum du sinsekvaj sabatoj mi aŭdis tre malfacile du interesajn elsendojn pri "Rendevuo Didaktika". Ĉar la temo estas por mi tre mteresa, mi multe dankos ai vi por la sendo de fotokopioj de tiuj elsendoj.

A.- Tion ni volonte faros, same por ĉiuj aliaj aŭdantoj petintaj la samon.

Cl.- Saluton al Saulcerite NEILANDE en Riga, Latvio, kiu estu dankata pro la alsendo de kvar mesaĝoj. Ni citas lin: "Mi preskaŭ ĉiusemajne aŭskultas viajn esperantajn programojn, kiuj estas utilaj kaj interesaj por mi. Aŭdebleco kutime estas bona.

A.- Sauicerite NEILANDE sciu, ke ni rigardas al la baltaj landoj kun la espero, ke fojon ili retrovos kompletan sendependecon. Ili estis okupitaj perforte, kiel nun Kovajto fare de Irako kaj kiel multe da aliaj landoj fare de koloniaj imperioj. Nia espero estas, ke sen armeaj detruoj okazos tiu liberiĝo. Prefere iom malrapida disvolviĝo, ol eksploda kaj detrua konflikto.

Cl.- Saluton al Jozefo kaj Csaba NEMES en Budapeŝto, Hungario, al Ladislav ODEHNAL en Brno, Ĉeĥoslovakio, Sigurd OLSSON en Strömsnäsbruk, Svedio, Andreo ARLOV en Moskvo, Ruslando kaj Paewel OLSZEWSKI en Stupno, Pollando, hazarda aŭskultanto.

A.- AI nia aŭskultantino Ilse PANASCHELL, en Vieno, kiu havis gravan koratakon, ni esprimas niajn resanigajn bondezirojn. Ŝi devis rezigni pri sia laboro favore al Aŭstria Radio en Vieno kaj havas pli da tempo por nin aŭskulti iom regule.

Cl.- Saluton al Jean PARMENTIER en Dikkelvenne, Belgio, kaj al Paul PARSONS en Thornton Heath, Britio, kiu esperas, ke foje niaj elsendoj povos konkeri siaprofite iom de la tempo nun dediĉita al muziko. Povus okazi io tia, se invadus la direktorejon de Svisa Radio Internacia pluraj centoj aŭ eĉ miloj da leteroj en la naciaj lingvoj, kiuj farus plilongigajn proponojn. Ni mem, kiel redaktoroj-prelegantoj, estas ĝojaj konstati, ke Esperanto konservas sian elsendotempon malgraŭ kritikoj de ĵurnalistoj nenion sciantaj pri esperanto kaj blinde kredantaj je ia internacieco de la angla. La nunaj eventoj en la mondo fortikigas la superregon de la angla lingvo kaj iom forgesigas pri la strebado de la esperantistoj.

A.- De nia kolego Rolando PELAZ en Radio Habana, Kubo, ni ricevus vivsignon, kiun ni reciprokas.

Cl.- Fraĉjo PENA GOMEZ en Salbrena, Hispanio, estas nova aŭskultanto. Li ĝojas, ke li komencas kompreni Esperanton.

A.- Saluton ai Roberto PENNY en Bury St Edmunds, Britio, al Ray PERSON en Didcot, kiu tre ŝatis niajn didaktikajn rendezuojn. Ni citu lin:

Cl.- "Dum la tri pasintaj semajnoj ĵaŭde... mi aŭskultis ege interese, eĉ fascine, la paroladojn de Claude kaj Andrée GACOND koncerne la didaktikajn rendezuojn kaj ties menciitajn strukturŝanĝajn ekzercojn. Kiel emerito, kiu tre malrapide kaj penige lernas Esperanton, mi povas pli facile memori novajn vortojn kaj esprimojn pere de la rektmetodo, ol per tradukmetodo. Mi jam studis la libron "Saluton", sed ĝis nun mi ne estas trovinta taŭgan sekvan lernolibron. Tial, vi povas imagi, ke viaj nunaj elsendoj estas tre helpigaj por daŭrigi nian studadon... Pliajn similajn elsendojn estontece mi petas.

A.- Ni provos kontentigi tiun aŭskultanton kaj multajn aliajn, alportante pliajn originalajn didaktikajn klarigojn en novaj rendezuoj. Multaj, kiel Ray PERSEN, plendas pri la manko de progresigaj kursoj. Tiun mankon certe kaŭzas la neinstruado de Esperanto en superaj lernejoj. Tio ne malhelpu al la studemuloj antaŭeniradon en la ellerno de la lingvo. A1 tiuj, kiuj petas nian konsilon por tiu ellerno, ni konsilas la atentan tralegon de libroj. Sed multaj petas konsilon por tiu tralego. Kiujn librojn akiri? Tial Kultura Centro Esperantista pretigis liston de konsilataj libroj kun Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Ni volonte sendos tiun ĉi rekomenditan legoliston por pretiĝo al trapaso de la elementaj kaj mezaj ekzamenoj de UEA/ILEI al la interesatoj. Ili petu ĝin skribante al nia esperanto-fako ĉe Svisa Radio Internacia, 3000 BERN 15, Svislando.

Cl.- Alfredo PETROV en Cochabamba, Bolivio, skribis: "Hieraŭ, tute hazarde, mi unuafoje aŭdis vian elsendon. Kaj li petis klarigojn pri la elsendhoraro de Svisa Radio Internacia.

A.- Saluton al Reinhard PFLÜGER en Mannheim, Germanio, al Manuel José PINGUINHA en Caldas da Rainha, Portugalio, al Lajos POMEI en Keckemét, Hungario, al F. POPPECK en Oberkirch, Germanio, al Reni PORTER en Halifax, Nova Scotia, Kanado, al John PRIMROSE en Harrogate, Britio, al Renimo PYSTYNEN en Hamina, Finnlando.

Cl.- Ĉu hodiaŭ nin aŭdas Suchanec RADEK en Roznov, Ĉeĥoslovakio, Sean RAVENSCROFT en Cape Town, Sudafriko, Koni REY en Lucerno, Svislando, Volker RIETZ en Jürgenshagen, Germanio, André RIGAUULT en Plouezec, Francio?

A.- Pri ĉiu elsendo aŭdraportas Ludwig RÖLL en Gunzburg, Germanio. 53 tiajn aŭdraportojn li sendis, depost nia lasta saluto.

Cl.- Ni reciprokas la salutojn de Lorenzo ROSATI en Roma, Italio, de Jean RUFER en Bern, Svislando, de Ego RUSA en Tann, Svislando kaj de P. Jan SADOWSKI OMI en Antsiranana, Madagaskaro, kiu aŭskultas ne nur la esperanto-programon de Svisa Radio Internacia, sed ankaŭ la itallingvan.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND remalfermos la venontan semajnon sian leterkeston por saluti la geaŭdantojn, kiuj sendis mesaĝon. Ĝis reaŭdo !